

Svisa federismo, 5-a parto
Claude Gacond, 157-a radioprelego, 1966.10.12 & 1966.10.15

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la svisa federismo kaj la provo federi Eŭropon.

En Svislando, post la napoleona erao, la intelektuloj, la komercistoj kaj la metiistoj sentis la restarigon de la malnovaj reĝimoj kiel malaperon de ekŝatata civitana libereco. Politikaj debatoj grupigis centojn da reformemuloj.

A.- La komercistoj deziras tutsvisan merkaton kun unuecigita monsystemo.

Cl.- La intelektuloj verkas eseojn pri la demokrata vivo kaj la libereco. Tiel kreiĝas doktrino, kiu baldaŭ ricevos la nomon liberalismo.

A.- La doktrino de la liberalismo entuziasmigas la civitanojn en la industriaj regionoj. En multaj kantoj adeptoj de la liberalismo estas elektitaj al registaraj funkcioj. Konstitucioj modernigas en kelkaj kantoj.

Cl.- Sed la doktrino de la liberalismo ŝajnas tro timema al la reformemuloj, kiuj deziras ĝisradikan sociajn ŝanĝigojn. Oni nomos tiujn revoluciulojn radikalistoj. Ili deziras starigi centralan superkantonan registaron, limigi la rajton de la industriaj majstroj super iliaj dungitoj, doni lernejon al ĉiuj infanoj, disigi la eklezion de la ŝtato.

A.- Tiu kuraĝa programo ekzaltis la naskiĝintan superkantonan patriotismon. Inter la jaroj 1826 kaj 1832, kiel ondeg, la radikala revolucio forbalais la aristokratajn registarojn en dekdu kantoj.

Cl.- Tiu radikala revolucio vekis fortan kontraŭstaron en la montaraj kantoj, kiuj posedas Landsgemeinde [popolkunvenon]. La civitanoj en tiuj kantoj praktikis de jarcentoj demokratan vivon kaj vidis en la radikalaj ideoj danĝeron kontraŭ la propraj politikaj kutimoj. Centrala superkantona registaro estus limigo al iliaj rajtoj. Jen neakceptebla revolucio.

A.- Tiu ideologia disputo rapide venenis la debatojn en la konfederacia Dieto. Ekde 1832 la radikalistoj reprezentis pli ol la duono de la svisa loĝantaro. La konservativuloj ilin timis kaj sisteme rifuzis iliajn proponojn. Responde la radikalistoj rifuzis la proponojn de la konservativuloj.

Cl.- Nesolvitaj problemoj amasiĝas. La spiritoj ekscitiĝas. La konfliktoj akriĝas kaj naskas novajn disputojn. La kunvivado inter la du partioj ŝajnas al multaj neebla. El tio armada konkuro kaj sekretaj paktoj inter la kantonaj registaroj.

A.- Ĉu tiu situacio ne similas al la hodiaŭa internacia atmosfero?

Cl.- En la kantono Bazelo la politikaj diskutoj kondukas al civilaj militoj. Baldaŭ ekzistas du konkurencaj registaroj. La urbo kun sia aristokrata reĝimo kaj la kamparo kun sia radikala konstitucio.

A.- Se tiu divido en du duonaj kantoj solvis la kantonajn disputojn, ĝi aliflanke nur povas akriĝi la kverelojn en la konfederacia Dieto. La ambasadoro de la urba Bazelo ne akceptas kunsidi en la ĉeesto de la delegito de la kamparana Bazelo.

Cl.- Anstataŭ kvietigi tiujn du spirite etmensajn delegitojn la aliaj delegitoj partoprenas ilian disputon. Por malhelpi ĉian voĉdonon en la Dieto la ambasadoroj de la kantoj Uri, Schwyz, Unterwalden, Valezo kaj Neuchâtel siavice rifuzas kunsidi kun la radikala bazela delegito.

A.- Ĉu tiu kverelo ne pensigas al similaj kvereloj, kiuj de longaj jaroj venenas la vivon en Unuiĝinta Naciaro?

Svisa federismo, 5-a parto
Claude Gacond, 157-a radioprelego, 1966.10.12 & 1966.10.15

Cl.- Ĝis nun la kvereloj estis nur politikaj. Sed en 1832 Papo Gregoro deksesas kondamnas la modernajn politikajn doktrinojn.

A.- Pro tiu kondamno formiĝas du tendencoj en la svisa katolikismo. La klerikema blinde obeas al la papo. La kontraŭklerikema volas kontrolon de la ŝtato super la eklezia vivo.

Cl.- La kantono Aargau havas religie miksitan loĝantaron. Pro tio ĝi konas reĝimon de konfesia egaleco. Tiu sistemo garantias en la Granda Konsilantaro saman nombron da deputitoj al ambaŭ konfesioj katolika kaj protestanta.

A.- La klerikema tendenco ne plu kontentiĝas pri tiu konstitucio. Ĝi deziras ĝian revizion kaj starigon de partigo de ĉiuj ŝtataj organoj laŭ la konfesioj. La katolikoj havu siajn registaron, justicon kaj parlamenton, kaj paralele ekzistu protestantaj registaro, justico kaj parlamento.

Cl.- Du referendumoj kondukas al starigo de nova konstitucio en kiu, por protesti kontraŭ la pretendoj de la klerikemuloj, oni ne plu okupiĝas pri la konfesioj. La katolikaj kontraŭklerikemuloj voĉdonis kun la protestantoj.

A.- La klerikemuloj ne povas akcepti tiun malvenkon. Tial ili organizas ribeladon. Sed la kantona registaro tuj reagis. Oni rimarkis, ke la monaĥoj partoprenis la ribeladon. Pro tio per cent dekvin voĉoj kontraŭ deknaŭ la Granda Konsilantaro decidas la fermon de la monaĥejoj. La granda plimulto de la katolikoj voĉdonis favore al tiu decido.

Cl.- En paca klimato tia decido ne estus kaŭzonta konfliktojn. Jam multaj fermo de monaĥejoj estis okazintaj en aliaj kantonoj.

A.- La konfederacia Dieto estas kunvokita. Ĉu ĝi kapablos interveni kun aŭtoritato ? En la lando oni sentas, ke tiu Dieta kunsido estos decidiga por la estonto de la svisa reĝimo.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon ! Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-